



Jarkolekto : 2010

Numero : 3

Paĝo : 1

# La Voĉo de Amikejo

Informilo pri *Senlime* kaj Esperanto en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

*Senlime*Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno  
Avec le soutien de la Communauté française**En cas de non-distribution, renvoyer à**

H. Lentzen

Feldweg 20

BE-4701 KETTENIS

Tel. xx-32-(0)87-55.43.26

E-mail : [lentzen@senlime.org](mailto:lentzen@senlime.org)**Editeur responsable****Responsa eldonanto +****Informoj en la franca lingvo:**

Tel. +32-(0)87/33.02.92

GSM +32-486-947.957

Mail: [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

Esperantista Grupo de Verviers

J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters

BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands****Informoj en la nederlanda:**

Tel. xx-31-(0)43-455.14.36

Mail: [parren@senlime.org](mailto:parren@senlime.org)

P.H.H. Parren, Heimansstr. 16

NL-6285 AM EPEN

**Informationen auf deutsch****Informoj en la germana:**

Tel. xx-49-2406-7809

Mail: [hogen@senlime.org](mailto:hogen@senlime.org)

K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43

DE-52134 HERZOGENRATH

**Aperas kvarfoje en jaro kaj****rete elŝuteblas ĉe****[www.senlime.org](http://www.senlime.org)****Prezoj por BE, NL kaj DE :****Unuopa n-ro : 4 EUR****Jara abono : 12 EUR**Bonvolu pagi, prefere decembre aŭ  
januare, **NUR** al la konto :**979-5327148-10**

IBAN : BE41 9795 3271 4810

BIC : ARSPBE22

(banque : Argenta)

de **Senlime**, 25 rue Pierre Fluche,  
4800 VERVIERS, Belgio.La kotizo (10 € - denove deviga)  
estas disigita de la abono al la  
papera versio de nia informilo (12€).

## Senlime

**kaj la Esperantista Grupo Verviersa  
invitas vin al promenada**

# Trilanda Renkontiĝo

**en Weris (BE-Durbuy)****Dimanĉon, la 3an de oktobro 2010 (10h00-17h00)**

- 10h00 : malfermo de la akceptejo en la megalita muzeo
- 10h45 : vizito de la muzeo (kun gvid-teksto)
- 11h30 : mallonga rondiro en la vilaĝo
- 12h00 : tagmanĝo en la restoracio «La Pierre Levée»
- 14h00 : 5 km-promenado ene de megalita kampo
- 16h00 : kafumado kaj manĝeto
- 16h30 : disiĝo (aŭ plia babilado, promenado,...)

<http://www.weris-info.be>

Aliĝkotizo (kun alvena kafo, gvidado kaj fina kaf-manĝeto): 10 EUR

Tagmanĝo (trinkaĵoj krome pagendaj): 25 EUR.

**Atentu** ke nur 20 personoj maksimume povas pikniki ene de la  
muzea trinkejo (kiu ne estas ekskluzive rezervita por nia grupo !).Bonvolu antaŭpagi la aliĝon kaj la tagmanĝon NUR ĉe la konto 979-  
5327148-10 de **Senlime** (pliaj detaloj ĉi-maldekstre).Klare menciui la celon de via pago, kiu **nepre** alvenu plej malfrue la  
25an de septembro : ĝi ebligas vian partoprenon (aliĝilo ne necesas  
– eventuala repago pro kiu ajn kialo principe neblas).

Bonvenon en Uerikso !



# Niaj programeroj lupee

## detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,...

### Filmoj pri esperanto/Amikejo

Ofte iuj el ni filmas ion ajn pri Amikejo (Neŭtrala Moresnet, Kelmis,...) kaj esperant(ist)o(j). Tiuj filmetoj tro ofte restas en tirkestoj aŭ komputiloj. Ni do kune rigardu kelkajn el ili (formato DVD) per granda ekrano.

Jen bona okazo revidi vin kaj viajn samideanojn en agrablaj cirkonstancoj. Se vi opinias interese vidigi filmeton vian, vi kompreneble povas tiucele kontakti nin...

**09-17** 19h30 BE-Kelmis, Sélect : Projekciado per granda ekrano de filmetoj pri esperanto/Amikejo.

Inf. [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

### Ĉu semajnfino en Weris ?

La regiono de Weris-Barvaux-Durbuy estas tre ŝatata de turistoj. Vi interalie povus tie viziti konfitaĵ-fabrikon, diamant-uzinon (Diamour), bierfarejon (Ferme au Chêne). Krom Weris, vizitindas ankaŭ la Bienon de Hottemme (150 hektaroj), la farm-kastelon de Grandhan, romanikajn preĝejojn en Tohogne kaj Bomal, kaj ĉefe la **grotajn en Hotton**.

Abundas hoteloj, gast-ĉambroj kaj kampadejoj en la regiono, sed **Senlime NE** mem peras loĝadon.

Lernu pli ĉe **Domo pri turismo** :  
25 Pl. aux Foires - 6940 DURBUY  
Tel. : +32 (0) 86 21 36 17 - 24 28  
Inf. [info@durbuyinfo.be](mailto:info@durbuyinfo.be)

### Trilanda renkontiĝo en Weris

La Verviersa Esperanto-Grupo organizas plian trilandan renkontiĝon en Belgio, precize en WERIS [Ueris], unu el la plej ĉarmaj vilaĝoj en Belgio, situanta sude de nia Euregionio Moza-Rejno.

Tiun vilaĝon oni kelkfoje (verdire sufiĉe troige) nomas "Belga Stonehenge" pro vasta tiea megalita kampo longa je 8 km.

La akceptejo estos la trinkejo de la muzeo pri megalitoj, malfermita ek de la 10a horo matene. Post vizito de tiu tre malgranda muzeo, ni piediros al la apuda restoracio «La Pierre Levée» [La ŝtono starigita = la menhiro !].

Menuo (25 EUR sen trinkaĵoj) :

- Dolmena pasteĉo, salato
- Ĉasaĵa raguo, fritbuloj, piro je vakcinioj sur celeria kaĉo
- Metiista glaciaĵo vanilo / spekuloso (belga biskvito seka kaj sukerita).

Posttagmeze ni ĝuos agrablan promenadon (5 km ! ) tra la megalita kampo... por fine kune trinki kafon kaj manĝi tortopecon en la trinkejo de la muzeo.

Deviga aliĝo kaj antaŭpago (35 EUR kun tagmanĝo, 10 EUR sen tagmanĝo) je la konto de

**Senlime** ĉe Argenta :  
IBAN : BE41 9795 3271 4810  
BIC : ARSPBE22.

**Limdato : 25an de septembro.**

**10-03** 10h00 BE-Weris, trilanda renkontiĝo de **Senlime**.  
Inf. [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

### Aranĝistaj klavaroj

Unu el la muzikaj metioj estas «Aranĝisto». La muzika aranĝisto estas kompleta muzikisto : li kreas aranĝojn. Li ne estas komponisto sed povus esti. Oni donas al li melodion (kun aŭ sen akompano) kaj li kapablas fari ĉion alian.

Li ekzemple povas ludi muzikon laŭ alia stilo (ritmo, k.t.p.) ol la originalo. Li povas adapti melodion por ke ĝi taŭgu por donita kantisto. Li povas aŭdigi la ĝustan noton per la taŭga instrumento, je la bona momento.

Jam de kelkaj jaroj, oni povas aĉeti muzikajn klavarojn kiuj, pere de elektronikaj cirkvitoj, povas fari tiun laboron. Per tiaj aparatoj, muziki iĝas multe pli facile.

Laŭ kelkaj, muziko estus internacia lingvo. Per tiaj aparatoj, tiu frazo trovas sian sencon. Muziko, kiel lingvo, estas tre malfacile lernebla. Estas konate ke deko da jaroj necesas por majstri tradician instrumenton.

Per klavaro aranĝista, oni multe pli facile kaj rapide atingas preskaŭ saman rezulton. Tion montros al ni J-M. Jacques per propra aparato «Roland EXR-5s», kiu (preskaŭ) ne plu kaŝos sekretojn al vi post tiu prelego.

Samtempe vi havos la okazon reaŭdi kelkajn iamajn muzikajn sukcesojn (el la «publika bieno») !

**06-18** 19h30 BE-Kelmis, Select: «**Aranĝistaj klavaroj**», prelego de J-M. Jacques.  
Inf. [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

# ESPERANTO

## Eŭregiona kalendaro 2010 (2/2)



**Senlime** publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de **Senlime**. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de **Senlime** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kulturcentro "Select", Lutlicherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro: Jean-Marie **Jacques** ([jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)).

**09-17** 19h30 BE-Kelmis,  
Sélect : Projekciado per  
granda ekrano de filmetoj pri  
esperanto/Amikejo.

Inf. [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

**10-03** 10h00 BE-Weris,  
Megalita Muzeo : **Trilanda  
renkontiĝo.**

Inf. [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

**10-15** 19h30 BE-Kelmis,  
Sélect: "**Aranĝistaj klavaroj**",  
far' Jean-Marie **Jacques**.

Inf. [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

**11-19** 19h30 BE-Kelmis,  
Sélect : "**La Habsburga linio  
en la Preus-arbaro**", prelego  
de Mathieu **Schrymecker**.

### 12-12 Zamenhof-festo

Dato konfirmota, loko kaj  
temo(j) konfirmotaj.



Pliaj kunvenoj en BE-Kelmis,  
Select, la: **01-21, 02-18, 03-  
18, 04-15, 05-20** kaj **06-17**  
(karaokeo).

**17-09** 19h30 BE-Kelmis,  
Sélect : Projection sur grand  
écran de petits films sur  
l'espéranto/Amikejo

Inf. [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

**03-10** 10h00 BE-Wéris, Musée  
des Mégalithes : **Rencontre  
des (espérantistes des) trois  
pays.**

Inf. [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

**15-10** 19h30 BE-Kelmis,  
Sélect: "**Claviers arrangeurs**",  
présentés par J-M. **Jacques**.

Inf. [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

**19-11** 19h30 BE-Kelmis,  
"**La ligne Habsbourgeoise  
dans la Preus-Wald**", par  
Mathieu **Schrymecker**.

### 12-12 Fête Zamenhof

Date à confirmer, lieu et  
thème(s) à décider.




Réunions suivantes au Sélect,  
La Calamine: **21-01, 18-02,  
18-03, 15-04, 20-05** et **17-06**  
(karaoke).

# LEG/END/AJ ŜTONOJ EN WERIS

La Verviersa Esperanto-Grupo organizas plian trilandan renkontiĝon en Belgio, precize en WERIS [Ueris], unu el la plej ĉarmaj vilaĝoj en Belgio, en la administra teritorio de la urbo DURBUY (plej malgranda urbo en Belgio), situanta sude de nia Eùregiono Mozo-Rejno.

Tiun vilaĝon oni kelkfoje (verdire sufiĉe troige) nomas "Belga Stonehenge" pro vasta tiea megalita kampo longa je 8 km.

Oni trovis en tiu regiono 28 diversajn megalitojn (kaj oni suspektas la ĉeeston de multaj aliaj), inter kiuj elstaras la dolmeno de Weris, tombo starigita de neolitikaj terkulturistoj, antaŭ 5000 jaroj... kio nepre pensigos nin pri Atlantido (Santorino), Keltoj (Hunoj), ktp...!



Agrabla tago en perspektivo, precipe se brilos aŭtuna suno - sed se pluvas vi eble memoros pri Bretonio (Karnak,...) kaj nepre kunprenu varmajn kontraŭpluvajn vestaĵojn ĉar ne ekzistas ŝirm-eblecoj en la kampara regiono kie ni promenos dum du horoj!

## Ĉu neolitika kalendaro ?

En la megalita kampo de Weris impresas nek la kvanto da ŝtonoj nek ilia grando, sed ĉefe iliaj evidente intencaj lokigoj, alliniigo kaj orientigo.

La arkeologo François Hubert, kalkulante pri la Ŝtono Haina, eldiris hipotezon pri la aranĝo de la monumentoj sur la megalita kampo.


La ŝtono Haina (fig. p. 5) estas roka pinto kiu nature elstaras el pudinga ŝtonaro, supre de la vilaĝo Morville. Ĝi eble utilis kiel observejon al la Neolitikaj homoj. Efektive ĝi precize staras oriente de la norda laŭbaleo, kio korespondas al ekvinoxsa orientiĝo sunsubira dum marto kaj septembro. Cetere, somersolstice starante apud la tri menhiroj de Oppagne la 21an de junio, oni vidas la sunon leviĝi malantaŭ la ŝtono Haina.

Ĉu hazardo aŭ spuro de ia neolitika kalendaro kiu ebligis al la terkulturistoj havi tempajn gvidosignojn ?

Astronomia hipotezo kiu permesas al François Hubert kaj liaj amikoj esperon trovi plian monumenton, prefere dolmenon, kiu korespondus al la mankanta orientiĝo de la sistemo, tio estas la vintra solstico...

François Hubert rivelas ankaŭ la perfektan paralelogramon formitan per la dolmeno de Weris, la ŝtono Haina, la ŝtono Sankta-Nikolao kaj la 3 menhiroj en Oppagne.

Li substrekas la inĝeniemon de la konstruintoj kiuj kapablis reporti ĝin sur la malebenan terenon. La ŝtono Sankta-Nikolao estas dika pudinga bloko elstara kiu tiam konsistigis elektindan gvidosignon en la pejzaĝo (hodiaŭ ne plu pro la boskoj).



Oni ankaŭ menciis la deklinacion aŭ angulon inter la geografia nordo kaj la akso de la linioj monumentaj de Weris. Tiu deklinacio estas 33°, kion ankaŭ rimarkis ĉe mulnombraj megalitejoj britaj la astronomoj Alexander Thom kaj Clive Ruggles. Ĉu denove plia hazardo aŭ ĉu tiu deklinacio, nek luna nek suna, korespondis al astronomia fenomeno nuntempe malaperinta, kiel stelo ?

## Kiel facile alveni al Weris ?

Nepre aŭtomobile (kvazaŭ ne ekzistas publikaj transportoj tie), per la aŭtovojo E25 (Lieĝo-Arlon) ĝis la elirejo 49 – Manhay – Grandmenil – Erezée – daŭrigu al Barvaux kaj ĝiru dekstren (post 4 km) al Weris (laŭ indikilo). Alta menhiro dekstre indikus ke vi jam preterpasis la vojon.

# LEGEND/AJ ŜTONOJ EN WERIS

## La Ŝtono de la Prauloj

Flanke de menhiroj kaj dolmenoj, troveblas en Weris neprilaboritan ŝtonon nomitan «Ŝtono Haina» [Hena]. Situanta sur monteto, ĝi iam estis videbla el la tuta regiono (malpli arbara ol nun).



Hena estus kelt-devena nomo signifanta «Ŝtono de la Prauloj» Dum ĉiu ekvinokso printempa, la enloĝantoj de Weris blanke pentris tiun ŝtonon kaj apude dancis.

Ĝis antaŭnelonge, tiu folkloro tradicio persistis kadre de ĉiujara «festo de la ŝtono», la unuan de aŭgusto.

Laŭ legendo, la ŝtono staras sur la enirejo de galerio kondukanta al la ter-centro. Kelkfoje, la diablo faligis la ŝtonon, eliris el la galerio kaj iris ripozi sur la «Lito de l'diablo» kelkcentojn da metroj fore. Sed, iam, li ne sukcesis reeniri la galerion, kaj de tiam vagadas en la regiono ! Atentu se vi renkontus ĝin !

## La Lito de l'Diablo

La Lito de l'Diablo estas monolito pli-malpli litforma. Kelkaj similigas ĝin al altaro. Niaj prauloj ankaŭ asociis ĝin al legendo.



Muelisto loĝis borde de la rivero «Aisne» [En]. Iam, la akvo ekmankis en la rivero kaj la muelisto konsentis vendi sian animon al la diablo kondiĉe ke tiu-ĉi konstruu barajon sur le rivero en ununura nokto. La diablo elfaris tion kaj vokis la mueliston. Sed nur hundo sin prezentis. Furioza, la diablo fulmrapide detruis la barajon kiun li dum la tuta nokto prilaboris. Elĉerpita, li iris ripozi sur la Lito de l'Diablo.

La postrestaĵoj de la baraĵo plu videblas en la loko nomita «Roche-à-Frêne» [roko je frakseno], 5 kilometrojn nord-oriente de Weris.

Se vi volas vidi la ŝtonon Hena, de Weris sekvu la ruĝ- kaj blankajn signalojn pri la Pado por Granda Ekskurso [GR 57]. Tabuloj indikos, dekstre, vojon por surgrimpi la monteton : post la Hena-ŝtono, malsupreniru maldekstren por trovi la Liton de L'Diablo.

## Bayard, la magia ĉevalo

Bayard [Bajar], la plej fiera balĉevalo kiun oni konis post Pegaso, ĉiam sunsubire galopas tra la Ardenoj, serchante siajn malaperintajn mastrojn. Per ununura hufobato, ĝi transiras riveregojn kaj valojn kaj poste malgaje skuiĝas, sentante sian larĝan dorson nudan, kiu iam kune portis kvar kavalieranojn, la kvar filoj de la duko Aymon [Emo].



Ĉie en la Ardenaj arbaroj, la rokoj konservis la spuron de Bayard. Frakasitaj, spektakle fenditaj kiel en Dinant, oni ofte nomas ilin sur la riveroj Semois, Ourthe aŭ Amblève «Pas Bayard» [Paŝo Bajar] aŭ «Rocher Bayard» [Roko Bajar].

En Weris, je la n°3 de la strato de la tri fontoj [Trois-Fontaines], larĝa kaj profunda foldo gravurita en ŝtonego estus la spuro de la hufo de la ĉevalo Bajar, kiu tie kursvingiĝis por kunporti per ununura saltego la kvar filojn de Aymon en la centron de Durbuy, 6 km foren !

# Verviersa Angulo

## Verviersa Esperanto Grupo

### Comité de V.E.G.:

Président: J. Jacob  
19 Chemin de la Rostibouhaye  
4910 POLLEUR (THEUX)  
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg  
25 Rue Pierre Fluche  
4800 VERVIERS  
Tél. 087/ 087/222030

Secrétaire: J.M. Jacques  
5 Rue Joseph Wauters  
4800 VERVIERS  
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association pour  
l'Espéranto (A.P.E.)

M. Delforge  
16 Rue des Glacières  
6001 MARCINELLE

### Cotisations

Les espérantistes et sympathisants  
sont cordialement invités à soutenir  
notre programme d'action en versant  
dès aujourd'hui l'une des cotisations  
suivantes au compte

n°: **000-0245571-64**

IBAN: BE29 0000 2455 7164

BIC: BPOTBEB1

(Banque de la Poste)

de:

Esperanto grupo

25 Rue Pierre Fluche

BE4800 VERVIERS

*La cotisation de **Senlime** est de  
nouveau obligatoire et fixée à 10  
EUR (l'abonnement à ce bulletin en  
version «papier» s'élève à 12 € en  
raison de l'augmentation des coûts).*

**D'avance, merci à tous !**

**A.P.E. 2009 (EGV) 14 €**

**U.E.A. 2010 (MA) 60 €**

**Senlime** (cotisation 2010) **10 €**

en indiquant le nom du membre  
cotisant, le bénéficiaire, l'année  
**«cotisation de .... pour ....».**

# Rencontres d'espérantistes

Tous les six mois, les espérantistes  
de la région des trois frontières  
(Allemagne, Belgique, Pays-Bas)  
organisent, successivement dans  
chacun des trois pays (d'où le nom  
de «**Trilanda**») pour découvrir un  
nouveau site ou aborder un  
nouveau thème, et démontrer du  
même coup – si nécessaire - le bon  
fonctionnement de l'espéranto.

C'est ainsi que le groupe  
espérantiste de Verviers invite ses  
amis à visiter ou revisiter, le 3  
octobre prochain, le site  
mégolithique de Wéris (Durbuy), le  
«Stonehenge belge».

Après une matinée studieuse au  
musée et un repas de midi  
convivial, ils se promèneront dans  
le champ mégalithiques où dolmens  
et menhirs ont été (re)découverts,  
restaurés... ou sont encore  
recherchés.

Mais ces «rencontres des trois  
pays» sont loin d'être les seules  
relations entre les espérantistes.  
Sans parler des contacts «virtuels»  
sur internet, qui se sont multipliés  
ces dernières années, et des  
réunions hebdomadaires ou  
mensuelles des groupes locaux (les  
Verviétois se réunissent le 3<sup>e</sup>  
vendredi de chaque mois à La  
Calamine, avec leurs amis d'Aix et  
du Sud-Limbourg Néerlandais), les  
séminaires et congrès divers ne  
manquent pas !

Différents stages et séminaires,  
d'une ou plusieurs semaines,  
donnent la possibilité de s'initier ou  
se perfectionner dans les domaines  
les plus divers, en espéranto...

**Les gens qui ne sont pas forts  
en langues étrangères disent  
des choses bien étranges...  
Prenez donc des cours  
d'espéranto !**

Pour permettre la participation de  
personnes défavorisées (tiers-  
monde,...), un système spécial de  
solidarité est souvent appliqué:  
c'est ainsi que selon leurs pays  
d'origine, les participants payeront  
un montant différent.

Diverses possibilités de logement  
sont également prévues, de l'hôtel  
de luxe au camping en passant par  
l'occupation d'un internat scolaire  
ou d'un home... Les espérantistes  
possèdent même leurs propres  
centres culturels (comme le château  
de Grésillon à Beaugé, en France,  
et le chalet de La Chau-de-Fonds,  
en Suisse).

Pour les voyages, un «Passeporta  
Servo» permet aux espérantistes de  
loger – le plus souvent gratuitement  
ou à peu de frais - chez plus de  
1500 espérantistes volontaires  
dispersés aux quatre coins du  
monde.

L'événement le plus attendu et le  
plus fréquenté est incontestablement  
le congrès de  
l'Association Universelle d'Espé-  
ranto (UEA), qui se déroule chaque  
année en été.

C'est La Havane (Cuba) qui a lancé  
l'invitation pour 2010 (du 17 au 24  
juillet). Les heureux participants y  
jouiront comme d'habitude d'une  
multitude de programmes les plus  
divers (plusieurs salles et salons  
doivent être occupés simultanément  
pour accueillir les participants  
(jusqu'à 6000 pour les congrès les  
plus réussis !).

Bien des occasions de vérifier le  
succès pratique de l'espéranto !

Un seul regret : je n'y serai pas et il  
n'y aura peut-être aucun Verviétois !

J-M. Jacques.